



18-a Jaro N-ro 197-198: Oomoto, KAMEOKA, Kioto-hu, Japanujo. Nov-Dec. 1956

Abonprezo: ¥ 240 por unu jaro; \$ 0.80 aŭ 12 Steloj por eksterlando: Abonebla ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando

Subtenu Japanan Kampanjon Por Instaligi Esp-Kurson en Radio-Programo

La Kansai (Kobe-Osaka-Kioto) - distrikta Plenumkomitato de la Japana Jubilea Kongreso 1956 kolektas personajn subskribojn por petskribi al NHK (Japana Brodkasta Asocio), ke ĝi fondu la Konstantan Radio-Kurson de Esperanto.

NHK dissendas ĉiutage tra la jaro la regulan kurson de la lingvoj: angla, franca, germana, hispana kaj ĉina. Nun, kiam la Rus-Japana Interkonsento de Diplomatiaj Rilatoj estas subskribita, oni ne bezonas dozon de vizio por profeti, ke NHK projektos baldaŭ enprogramigi la rusan lingvon.

La japana lernemo de fremdaj naciaj lingvoj estas tradicia. Japanoj lernis antaŭ 13 jarcentoj la ĉinan kaj antaŭ 2 j. c. la holandan por enkonduki la fremdajn kulturojn. Ambaŭ lingvojn ili lernis kaj studis, tamen ne en la senco de moderna lingva studo. Ili lernis, ekzemple, la ĉinan nur por kompreni ĝin laŭsence kaj skribi. Ili legis ĝin propramane laŭ la reguloj de la japanlingva sintakso kaj prononco. Estis pli-malpli same ankaŭ pri la holanda. La unua okcidenta libro, kiun la japanoj iam tradukis, estis *Tafel Anatomia*, verko de la holanda doktoro *Kulmus*. Kelkaj junuloj kunsidatis por laboro ĝin traduki. Sed ili "nur gapadis al ĝi sence kion fari, kvazaŭ veturi oceanon per ŝipo sen remilo kaj direktilo". "Eĉ la vortetoj kiel *de* (la), *het* (la, ĝi; li, ŝi), *als* (kiel), *welk* (kiu), ne estis konataj" tiel, ke "ĉiu frazo estis tuta enigmo" por ili. Ofte la "tutaj longaj printempaj tagoj ne estis sufiĉe longaj por deĉifri unu-du colojn da frazo". Ili "rompis al si la kapon" ekzemple, super la frazo, kiun ili fine komprenis: "La nazo *verheffend*

(t. e. elstaras) en la mezo de la vizaĝo¹⁾. Post kvar jaroj da kaprompa penado ili sukcesis elfari la tuta tradukon, kiu eldoniĝis en la j. 1774.

La lingvolernantoj en ambaŭ okazoj, la ĉina kaj la holanda, estis la pioniroj de nova kulturo. Aparte la lernantojn de la holanda siatempe oni nomis "bravuloj" tial, ke ili "legis fremdlandan libron" spite la malpermeson de la tiama registaro.

Hodiaŭ, la vojo al ĉiu fremda lingvo jam estas glatigita teknike. Nur praktike, la lingvo-metia mallerteco de japanoj estas tiel eminenta kiel tradicia. Kaj tamen, multaj japanoj mordas fremdan lingvon pro nura vantemo. Dum la Pacifika Milito, kiam Japanujo ankoraŭ estis la konkeranto sur la sudmaraj insuloj kaj duoninsuloj, mi memoras, kiom multaj novaj aboco-libroj germana, itala, malaja, java, birma, tagaloga (nord-filipina), siama, anama (vietnama) k. a. inundis la standojn de librovendejoj! Kaj kiom malkare, senpage preskaŭ, oni povis aĉeti la anglalingvajn librojn kaj vortarojn stapligitajn en polvo ĉe malnovlibrejoj! Sed per unu tago, en kiu Mak Artur surlandiĝis sur nia tero, la tajdo renversiĝis. Ĝi forportis englute preskaŭ ĉiujn librojn de la sudmaraj lingvoj — kien oni ne scias. Dek unu jaroj pasis. Kaj nun estas la vico de la rusa, kiu furoros paralele kun la vestmoda "magnet-linio" de Kristian Dior. Japanoj ankoraŭ lernos kiun ajn lingvon de la mondo, se ĝi iĝus laŭmoda. Tio ne estas riproĉinda. Mi nur timas, ke N-ro 2 Programo de NHK, kiu estas por popol-edukado kaj -klerigado, baldaŭ fariĝus plena de lingvoj. Cetere, la fremdaj lingvoj por la plejparto de la popolamaso estas kvazaŭ muziko por la hundo Viktor-gramofona. Ni tamen lasu tiujn aŭskulti, kiuj havas orelon.

Kompreneble, mi ne asertas, ke la lingvolernado jam ne estas necesa por la japanoj. Ĝi estas ĉiam ankoraŭ necesa. Kaj mi scias, ke troviĝas granda nombro da japanoj, ĉu profesiuloj, ĉu dilettantoj, kiuj lernas, studas kaj uzas fremdan lingvon multe pli serioze, ol la suprealuditaj frivolaj tipoj. Ili estas la studentoj, instruistoj, interpretistoj, tradukistoj, ĵurnalistoj, literaturistoj, lingvistoj, ktp. Sed la fakto, kiun mi volas substreki ĉi tie estas, ke kvankam ili eble estas la portantoj de la moderna kulturo, tamen ili jam ne estas la pioniroj en la senco, laŭ kiu la vorto iam estis uzata en nia lando. Tion pruvas la lingva-kultura historio de Japanujo.

Antaŭ duonjarcento Esperanto semiĝis en nia lando. Hodiaŭ kelkaj miloj da celkonsciaj Esperantistoj laboras kiel "bravuloj" en la moderna senco de la vorto. Se ne ekzistas la lingva malfacileco por ili, ili

tamen devas konstante disfali la fortikaĵojn de antaŭjuĝo — antaŭjuĝo blinkenberga²⁾.

Unu ĵurnalista, kiu estas poligloto kaj radiofamulo en la reto de NHK, foje-foje, tute senĝene misfamigas, ke Esperanto estas speco de latinido artefarita; ke ĝi ne estas tiel facila, kiel la Esperantistoj kredigas; ke nenie li renkontis eĉ unu Esperantiston dum sia mult-jara restado en multaj partoj de Eŭropo; ke estas multe pli utile lerni iun ajn fremdan nacilingvon ol Esperanton, ktp. Estas bedaŭrinde, ke neniu japana Esperantisto estas privilegiita doni sian liberan voĉon ĉe la mikrofono kiel li.

Ni do bezonas kolektive agadi energie kaj sisteme, tiom pli, ĉar se temas pri la popularigo de Esperanto en la tempo de amaskomunikado, neniu dubas, ke la radio estas la plej potenca disvastigilo. Ni devas alpaŝi la plej altan instancon de la japana radio, por ke Esperanto trovi sian lokon en ĝia programo. Jen kial la nuna kampanjo de la Kansai-Plenumkomitato por instaligi la konstantan kurson de Esperanto en la programo de NHK estas nepre subteninda. Ĝi estas iniciatita eĉ tro malfrue.

Mi iam publikigis japanlingvan artikolon, en kiu mi alvokis la japanajn Esperantistojn, ke ili persone skribu al la radio-asocio pri la fondigo de Esperanto-kurso. Hodiaŭ mi min turnas al la tutmondaj Esperantistoj kun jena peto: Bonvolu skribi individue aŭ kolektive al NHK, postulante (taktoplene!) la Esperantan disaŭdigon de novaĵoj, informoj kaj muzikoj el Japanujo. Mi ne dubas, ke en Japanujo oni pli aŭskultos la voĉon de okcidentanoj, ol tiun de sampatrujanoj. Kaj tio grande helpos turni la tajdon favore al la kampanjo de la Kansai-Plenumkomitato. Anticipan dankon! (Adreso: NHK, 2 Uĉisaiŭai-ĉo, Ĉijoda-ku, Tokio, Japanujo.)

Teruo Mikami

¹⁾ El "La Unuaj Tagoj de l' Holandlingva Studo", la rememoraĵoj el la jaroj 1771-1774, verkita en 1815 de Genpaku Sugita, unu el la kuntradukintoj de *Tafer Anatomia*. En tiu tempo la "holandlingva studo" implicis la studon de la okcidenta scienco.

²⁾ Blinkenberg estas la dana profesoro, kiu ĉe la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo ridindigis sin ridindigante Esperanton.

Destino kaj Sorto

Ĉi tio okazis en templo de Ŝinŝu-sekto¹⁾, kiu troviĝas en la urbo Kanazaŭa, Iŝikaŭa-prefektujo. La nomon de la templo mi kaŝas en mia rakonto.

En tiu templo estis familikodo, kiu diras, ke la unuanaskito de ĉiu generacio heredu la templon senkonsidere pri la sekso. Tio signifas: se la unuanaskito estas ino, oni devas adopti bonzon kiel ŝian edzon.

Antaŭ multaj jaroj okazis, ke al la familiestra bonzo kaj lia edzino naskiĝis filino unue, kaj kelkajn jarojn poste filo. La patrino tiel amis la filon, ke ŝi deziris igi lin heredi la templon laŭ la ĝenerala kutimo. Sed ŝi devis ne rompi la familikodon, kiun cetere insistis gardi ŝia maljuna bopatrino. Por eviti disputon pri la heredrajto, kiu povus okazi en la estonteco, la bopatrino interkonsiliĝis kun la tuta paroĥanaro. Oni decidis, ke la filo estu adoptita en fremdan familion dum li estas suĉinfano. Lin adoptis iu familio.

La infano fariĝis junulo dum li ne sciis ke li estas adoptita filo. En tiu tempo, kiam la Rus-Japana Milito venis al la fino²⁾, li loĝis en Tokio. Lia nomo estas s-ro Kosabro Macutoo, nun Oomotano en Komacu, Iŝikaŭa-prefektujo.

Iun tagon, kiam li ankoraŭ estis juna kaj loĝis en Tokio, li ricevis telegramon de s-ro Ootani, lia plej intima amiko en la urbo Kanazaŭa. Li legis: GRAVA AFERO OKAZIS VENU TUJ. Li eĉ ne povis konjekti pri kio temis, sed respondis al s-ro Ootani sciigante la horon de sia alveno en Kanazaŭa. Kiam li elvagniĝis ĉe Kanazaŭa, li trovis sur la kajo ne nur s-ron Ootani, sed sep-ok personojn, inklude bonzojn en roboj kaj sinjorinojn en belaj kimonoj, kiuj ĉiuj afable lin bonvenigas. Kun scivola sed afabla mieno ili ĉiuj rigardas en lian vizaĝon. "Vere la portreto de...", ili murmuris inter si. Kosabro estis embarasata. Li demandis s-ron Ootani:

"Kio okazis, ke vi urĝe bezonis min?"

"Nu, nu, vi baldaŭ mem vidos, amiko."

S-ro Ootani prenis lin ĉe la brako kaj puŝis lin en rikiŝon (tiu-tempe aŭto ne estis uzata). Ĉiuj aliaj ankaŭ enrikiŝiĝis. Post iom da veturado la rikiŝoj haltas antaŭ la pordo de templo. Oni enkondukas Kosabron en gastoĉambron de la templo. Oni alportas al li teon kaj kukojn.

"Pro kio vi kondukis min ĉi tien?" senpacienkis Macutoo.

"Momenton, kaj vi vidos," la amiko ridetas.

Baldaŭ venis en la ĉambron la gesinjoroj, kiuj bonvenigis lin ĉe la stacidomo.

"Bonvena vi estas, kara sinjoro!" ĉiuj salutas lin afable.

Ĉu bonvena aŭ malbonvena, li ankoraŭ ne scias. Tiam s-ro Ootani klarigis la aferon:

"Macutoo! Tute simple, vi naskiĝis en tiu ĉi templo."

"Ne ŝercu! Mi havas gepatrojn, — sed aliloke," Kosabro protestis.

Post longa diskutado fariĝis klara almenaŭ la fakto, ke antaŭ dudek jaroj oni forsendis la filon de la templo en fremdan familion kaj la bonzo nun serĉadas lin, ke aŭdinte pri tio, s-ro Ootani, kiu bone konis la familian aferon de la templo, povis identigi lin kun Kosabro Macutoo, lia plej bona amiko en Tokio, kaj ke, laŭ la obstina peto de la bonzo, li telegramis al Kosabro por venigo.

"Malgraŭ ĉio, gesinjoroj, — vi vane konvinkos min sen pruvoj," ankoraŭ rezistis Kosabro.

"Vi ne malprave suspektas; jen do rigardu tion ĉi," tiel parolante la bonzo montris al li tre malnovan leteron. Ĝi estis la letero pri filadoptado, skribita per la mano de lia adoptopatro kaj adresita al la bonzo. Kiam li legis la enhavon, li cedis.

Kvar jaroj pasis, la adoptopatro de Kosabro grave malsaniĝis. Li venigis la filon apud la liton kaj diris:

"Antaŭ ol forspiri, mi havas aferon, kiun mi devas malkaŝi al vi. Mi amis vin kiel mian propran filon, sed vin mi adoptis el budaisma templo en Kanazaŭa."

"Patro, tion mi jam sciis, do estu trankvila."

Baldaŭ la duonpatro mortis. De tiam la filo frekventis la templon, kie loĝas liaj veraj gepatroj.

*

En la novjara tago de la sekvanta jaro, Kosabro vizitis la gepatrojn ĉe la templo. Tiam lia patrino diris al li:

"Vi ne scias, sed en vi reenkarniĝis via onklo Hiromiĉi Mijoŝi."

La filo mireĝis. Ŝi montris al li leteron.

“Kies skribaĵo ĝi estas, ĉu vi povas diri?” demandis la patrino.

“Mia.”

“Kies skribaĵo estas ĉi tiu, ĉu vi diros al mi?” ŝi montris alian leteron.

“Mia.”

La patrino montris al li plurajn aliajn leterojn per la sama demando, kaj la filo ĉiam respondis: “Mia.”

“Nu do, legu unu el tiuj,” ŝi diris.

Kosabro tiris unu el la koverto kaj legis:

“Kara Sinjoro, mi informas vin, ke la ĉarizarboj ĉi tie estas nun en plena florado. Bonvolu viziti nin kiel eble plej frue, ĉar post kelkaj tagoj mi cetere planas forveturi al—. Ĉi tie en la ŝintoisma sanktejo ĉio estas purema kaj pli hela ol en budaisma templo...”

Li interrompis la legadon. Li neniam memoras, ke li skribis tian leteron. Ĉe la fino de la skribaĵo li trovis la subskribon: *Hiromiĉi*. La skribmaniero estas preskaŭ sama kun la lia.

“Legu alian leteron,” ree parolis la patrino. Li legis. Denove la skribmaniero, kiun li rekonis kiel sian propramanan, estis tiu de *Hiromiĉi*,

“Kredu al mi,” daŭrigis la patrino, “viaj movoj, gestoj kaj trajtoj redonas al mi la vivan portreton de Hiromiĉi, via onklo. En vi estas io, kio pruvas lian reenkarniĝon. Vi vidu, mi ĵus montris al vi plurajn leterojn de vi kaj via onklo, kaj vi vane identigis la viajn....”

Sen vortoj la filo aŭskultis.

Li ne konis la onklon. Tiu ne plu vivis kiam li naskiĝis.

La onklo siavice naskiĝis en iu templo. Sed en sia juneco li estis senheredigita je la pastreco pro malbonkonduco. Li do poste servis en ŝintoisma sanktejo kaj mortis en la aĝo sufiĉe maljuna. Post lia morto naskiĝis Kosabro....

Tiel rakontis la patrino pri lia onklo.

Kosabro dronis en meditado. Li miris, ĉar la ĉeftrajto de lia ĝismuna vivo pli aŭ malpli koincidas kun tiu de sia onklo. Li ankaŭ naskiĝis en templo sed estis devigata heredi alies familion; li ĉagrenis la duongepatrojn pro diboĉemo en la juneco; li havas personan rilaton kun ŝintoisma sanktejo... Ĉiurilate li tiel similas al sia onklo. Precipe, la identeco de iliaj skribmanieroj frapis lian koron.

*

Mi rakontis pri la vivo de Kosabro Macutoo por pruvi la okazeblon de la reenkarniĝo kaj por studi ĝian instruon. De la reenkarniĝo estas

tri specoj. Tiujn tamen mi ne pritraktos ĉi tie³⁾.

Se homo povas konscii, ke li estas la reenkariniĝinto de tiu aŭ alia persono, kiel en la okazo de Kosabro Macutoo en la supra rakonto, li havas tiun avantaĝon, ke li povas facile rimarki siajn malfortecojn aŭ malbonajn emojn en referenco kun la vivo de sia ‘antaŭulo’ kaj povas eviti al si la vojsulkojn de ‘malnovaj’ kutimoj. Tio multe helpas por lia orientado. Kaj se tiel li povas elekti por si pli bonan vojon, ol tiun de sia antaŭirinto, li povas esti kontenta kaj dankema pro la vivo. Ĝenerale, tamen, tia memkonscio ne estas ebla.

La homo ne konscias en kia viv-fazo li estis ekzistanta antaŭ ol li naskiĝis en tiun ĉi mondon. Lia viv-koncepto estas limigita nur en la kadro de *si* kaj la *nuno* tiel, ke li facile plendas kaj ribelas kontraŭ la medio. Tio estas tre natura. La homo, malgraŭ ĉiuj siaj penoj kaj streboj, facile ne povas vivi la vivon tute malsame, ol kiel li vivis en sia antaŭvivo.

Ekzemple, semo de la pino. Se ni semas ĝin, ĝi ĝermas kaj fariĝas pinarbo. La pino donas pinfruktojn. Prenu novan semon kaj ĝin subterigu. Ĝi fariĝos pino. Tiu pino ne povos esti tute alispeca, ol ĝia ‘antaŭulo’. La esenca karaktero de la pino ne povas ŝanĝiĝi subite. Sed tio ne signifas, ke ekzistas neniom da libereco por ŝanĝiĝo. Efektive estas granda amplekso da libereco. Se vi semos plej bonan semon en plej fekundan teron, kie ĝi povas esti saturita per abunda sunlumo, freŝa aero kaj riĉa sterko, ĝi fariĝos bona pino. Sed se vi semos la semon en malriĉa tero, ĝi kreskos tre mizera. Depende de la klimato kaj ĉiuj aliaj kondiĉoj, la esenca karaktero de la pino ŝanĝiĝos iom post iom en la daŭro de longa tempo.

La japanaj enlandaj piceoj⁴⁾ kaj larikoj⁵⁾, se ilin oni kultivas en Hokkaido, la plej norda insulo de Japanujo, fine fariĝas koniferoj havantaj iom platajn foliojn. Se oni kultivas la umeojn⁶⁾ en certaj regionoj de Ĉinujo, ili fine fariĝas abrikotujoj. Se oni transplantas la japanajn pinojn en Formozon, ili ŝanĝiĝas en pinojn kun longaj folioj. Jen la ebleco por semoj kaj arboj ŝanĝiĝi en la daŭro de longa tempo. La ŝanĝiĝo ne povas okazi en subita maniero: Koniferoj neniel povas ŝanĝiĝi en fiŝojn. Tiu difinita eco, kiu latentas en semo; tiu propra emo, kiu kuŝas en semo, tiun oni nomas ‘destino’.

Destino

“Destino” estas *sukumei* (宿命) en la japana lingvo. *Ŝuku* (宿) signifas: enteni, konservi aŭ porti en si. *Mei* (命) signifas: ordono

de la ĉielo; la sinonimo de "destino" aŭ "vivo". Do, "destino" estas: la ĉiela ordono entenita en ĉiu homo, kiun li ne povas propravole eviti.

Ne nur la homoj, sed ankaŭ la animaloj, la vegetaloj, la mineraloj, ĉiuj portas en si la ĉielan ordonon aŭ mision. Nenio estas kreita de Dio, kio ne portas en si la mision por *uzo* kaj *celo* -- la destinon. Ĝin havas ĉiu kaj ĉio -- viva aŭ senviva. Neniu povas ĝin ŝanĝi arbitre; ĝi estas antaŭdestinita por uzo kaj celo. Nenio ekzistas en la universo, kio hazarde kreiĝis, hazarde kreskas, hazarde evoluas -- sen la destino. Ĉiu portas en si la kreitkaŭzon kaj la ekzist-kialon. Jen la destino.

La destino estas kiel ia speco de viv-ciklo, kiel mi jam klarigis per la ekzemplo de semo de la pino. Por klarigi ĉi tion, ni rememorigu al ni la rakonton pri Kosabro Macutoo. La bonecoj kaj malbonecoj de lia onklo, Hiromiĉi Mijoŝi, havas neeviteblan kaj neapartigeblan rilaton kun la vivo de Kosabro. Se lia onklo estis mortinta antaŭ ol reguligi la konton pri la meritoj kaj malmeritoj dum sia surtera vivo, Kosabro, lia reenkariniĝinto, vole-ne-vole devas porti sur si la saldon kaj ĝin likvidi dum sia *nuna* vivo.

Same ankaŭ pri la homaro -- entute. La tuta homaro portas sur si la tutan respondecon por likvidi la konton de ĉiuj bonfaroj kaj malbonfaroj de ĝiaj antaŭuloj. Neniu el la homaro rajtas plendi pro la nuna mondkrizo, nek rajtas fuĝi el la rigora mondsituacio. Ĉiu el la homaro devas klopodi per ĉiuj eblaj rimedoj por plibonigi kaj plibeligi la mondon.

Same, ĉiu gento aŭ ĉiu raso portas sur si la devon por likvidi la konton de siaj prauloj. Same ankaŭ pri ĉiu nacio, ĉiu familio kaj ĉiu individuo. Neniu naciانو kaj neniu familiano rajtas, nek povas eviti tion, ĉar li naskiĝis en tiu lando kaj en tiu familio ne sen la destino.

Sorto

Paralele kun la destino ekzistas io, kion oni nomas la sorto. Kelkafoje oni miksuas ambaŭ. Mi precize distingas ilin unu de la alia. Mi jam klarigis pri la destino, ke ĝi estas la ĉiela ordono aŭ misio, destinata por ĉiu estaĵo, kiel la definitiva eco aŭ emo en semo.

"Sorto" estas *unmei* (運命) en la japana lingvo. *Un* (運) signifas: porti aŭ transporti. *Mei* (命) signifas: la ĉiela ordono. La sorto do estas pli malfiksa, ol la destino. Per ĝi oni portas semon (destinon aŭ ordonon) dum sia nuna vivo tiel, ke ĝi plej bone ĝermu kaj elkresku por la plena evoluo. Dum la destino estas antaŭfiksita, decida kaj difina, la sorto estas io, kio estas disponebla de ĉiu homo, kiel la japana

vorto signifas. Depende de la dispon-maniero (sorto) de sia semo (destino) ĉiu homo povas progresi aŭ regresi, evolui aŭ malevolui, vitiĝi aŭ degeneri, ktp.

Ni imagu ekzemple, ke Hiromiĉi Mijoŝi, la onklo de Kosabro Macutoo, suferis gravan kaj longan malsanon kiam li estis 15-jaraĝa. Se la spirita kaŭzo por lia malsano ne estus entute forviŝita dum lia vivo, lia reenkariniĝinto Kosabro neeviteble fariĝas malsanema kiam li atingas la proksimuman aĝon, ĉar li nature emas vivi laŭ la viv-ciklo de sia onklo; li emas iri sur la stoplejon de lia pasinteco; li emas fali en ties vivsulkojn. Kvankam tio estas destina, neniel tamen fatala por li tial, ke lia sorto estas sub lia dispono. La vivo prezentas al ni vastan terenon por kultureblo; jen kial ĝi indas por vivi, kaj ni povas fari pli grandan evoluon en la nuna vivo, ol en la antaŭvivo.

Se la ĉerizarbo povis flori pli bele nunjare, ol en la pasinta jaro, tio estas tial, ĉar ĝi absorbis en si pli favorajn kondiĉojn necesajn por la vivo. Tio estas la sorto de la ĉerizarbo. Ĝi tamen ne povas ekflori en aŭtuno aŭ en vintro. Tio estas pro la destino de la ĉerizarbo. Ĝi ne povas doni florojn po ses aŭ sep petaloj. Tio ankaŭ estas pro la destino.

Sed en la okazo de la homo, li havas la liberan volon, kiu mankas al la arbo. Tial eĉ se li havas en si malfavoran destinon, li tute ne bezonas ĉagreniĝi, nek malesperi tial, ĉar li povas 'porti' sian sorton laŭ sia libera volo.

¹⁾ Budaisma sekto

²⁾ 1905

³⁾ Tri specoj de la reenkariniĝo:

1. PLENA REENKARNIĜO: La plena renaskiĝo de infanmortinto aŭ mortnaskito. (Malofta).

2. PARTA REENKARNIĜO: La enkariniĝo de la malbonaj elementoj de homa spirito, la bonaj restante en la spirita mondo. (Ofta).

3. POSEDA REENKARNIĜO: Fremda spirito posedas la spiriton de infano ĉe la naskiĝo. La karaktero de l' infano en tiu okazo estas duobla. Tamen la posedanta spirito pli aŭ malpli frue eliras, kiel ofte okazas al la "mir-knabo", kiu pli malpli frue fariĝas ordinarulo de post kiam la posedanta spirito forlasas lin. (Malofta). *Laŭ la klarigo de l' aŭtoro.*

⁴⁾ *Picea jezoensis*

⁵⁾ *Larix Kaempferi*

⁶⁾ *Prunus Mume*

Du Grandaj Leĝoj

Petro Danov*

En niaj tagoj, kiel en la pasinteco, manifestiĝas du specoj da homoj kun du kontrastaj komprenoj: Tiuj, kiuj amas la Veron, vivas for de la vulgara vivo kaj tie ili laboras. Kaj aliaj, kiuj verkas la naturan filozofion kaj gvidas la homaron konforme al ĝi. Tiuj naturaj filozofioj sugestiis al la homoj la nuntempajn konceptojn pri la vivo kaj la mondo. Unu el la asertoj, kiujn tiuj filozofoj enigis en la homan cerbon estas, ke la homo naskiĝis por morti. Kaj kia filozofio estas en tio? Egale estas diri: tiu fama pentristo verkis pentraĵon por ĝin neniigi, tiu fama skulptisto skulptis statuon por ĝin detrui, la patrino naskis infanon, kun ĝia bela kapeto, por ĝin dispreni. Kian sencon havas tia kompreno per ĝiaj ekstremaj, sed senmotivaj konk-ludoj?

Ankoraŭ alia kompreno pri la vivo estas, ke ĝi estas batalo, do la homoj devas batali, devas sin reciproke ekstermi. Ĉu tiel devas esti, tion al ni montras la teruraj epizodoj de la milito. Ni ilin ne pentros, ĉar ĉiu ilin konas. Sed tra la stratoj vi ofte renkontos fenomenojn — ne senkorpajn sed kun kripla, malgrasega korpo, aŭ

flikita kelkaloke aŭ kun membroj lignaj. Ili estas vivaj atestantoj pri la erarigoj de la naturaj filozofioj. Tiuj filozofoj hodiaŭ okupas ĉiujn katedrojn en la vivo: en la scienco, en la politiko, en la religio, kaj altrudis kredojn, kiuj venenas la vivon. Ili havas nenion komunan kun la grandaj filoj de la Veron, kiuj donis al la homoj veran, ĝustan instruon. Ili ne komprenas la profundan sencon de la vivo.

Ankoraŭ alia natura kompreno pri la vivo, nutrata de nekleraj religiaj societoj estas, ke la homo naskiĝas sur la tero, vivas kelkan tempon kaj foriras en la transan mondon, por iri ĉu en la inferon, ĉu en la paradizon. Facila klarigo de la granda tasko de la vivo, tamen, tiu tasko ne estas solvebla dum unu, dum cent, dum mil, eĉ dum kelkaj milionoj da jaroj. Ĝi estas tasko, kiun nur la eterneco, per siaj senfinaj manifestiĝoj, povas solvi. Kiam la homo solvos tiun taskon en ĝia unua granda, do, kiam li perceptos, kio estas fizika vivo sur la tero, li komprenos parte la grandan prudenton, kiu suprenigas la tutan homaron, gvidante ĝin laŭ vojo de seninter-

rompa disvolvigo.

La religiuloj havas tre ridindajn komprenojn pri profetoj, pri sanktuloj kaj pri ĉio, kion ili adoras, nekomprenante ilin. Ili supozas, ke la lastaj atingis sian internan potencon nelernante. Ekzemple, oni opinias, ke Johano la Baptisto estas ordinara, simpla ermito. Tamen, li konis la fundamentojn de la profunda okulta scienco, de la Dia instruo. Li ne estis el la simplaj malkleraj profetoj. Li lernis en unu el la grandaj lernejoj de la pasinteco kaj estis tre klera homo. Ankaŭ pri Kristo oni diras, ke li ne lernis en lernejo. Oni volas diri, ke nelernante, li sciis. Tio estas alia natura kompreno. Ne, Kristo antaŭ nuloj da jaroj lernis en unu el la plej grandaj lernejoj, en unu el la plej famaj skoloj. Li mem diras: "Kiel la patro min instruis, tiel mi faras". Tio signifas, ke li lernis tie, kien la aliaj, la naturaj filozofoj eĉ ne povas eniri. Li lernis ĉe Dio. Lerni ĉe Dio, tio signifas lerni en la skolo, en kiu estas unueco. En ĝi instruas la plej bonaj instruistoj. Ĝi ne similas niajn universitatojn. En ĝi estas neniaj hipotezoj, neniaj teorioj. Kiam en tiu skolo oni deziras trovi la distancon inter la tero kaj la suno, la profesoroj kune kun siaj lernantoj ekiras de la tero al la suno kaj mezuras ĝuste la distancon — ĝuste, nek milimetro pli, nek malpli, tiel preciza estas ilia mezurado! Se ili deziras scii

la distancon inter la tero kaj la siriuo, ili ree ekiros ekspedicie per pli granda rapideco ol la unua, kaj faros plej precizajn fizikajn kalkulojn. Ankaŭ iliaj kalkuloj estos ĝustaj, nek unu milimetro pli, nek malpli. Oni, ekzemple, deziras ekscii, ĉu sur iu ajn planedo loĝas prudentaj estaĵoj. Por konstati tion, oni ree sendas ekspedicion, kiu en plej baldaŭa tempo revenas kaj raportas: ni vidis kaj ni scias! Ĉe la nunaj esploroj de la astronomoj per teleskopo, oni rimarkis iajn kanalojn sur la planedo Marso — kelkiuj aŭguris, ke ili estas trafositaj de raciaj estaĵoj; aliaj asertas, ke ne estas. Ĉiuj ĉi tiuj aŭguraĵoj vere estas bonaj amuz- aĵoj.

Ankoraŭ alia natura koncepto estas, ke la eksteraj kondiĉoj kaŭzas la vivon. Ili volas nin konvinki, ke tiuj kondiĉoj diktas la agojn. Ekzemple ili asertas, ke la kondiĉoj devigas la aglon manĝi viandon. Sed kiu devigas la kolombon manĝi grajnoj? Ĉu ĝi ne vivas en la samaj kondiĉoj en kiuj vivas la aglo? Kiel estas eble, ke vivante en samaj kondiĉoj, la aglo manĝas viandon, kaj la kolombo grajnoj? La kolombo havas multe pli altan komprenon pri la vivo, ĝi portas pli altan kulturon en si. Interalie ni diros, ke la okulta scienco havas pli diferencajn konceptojn pri la birdoj, pri la bestoj, ol la konceptoj

de la nuntempa scienco. Do, kiam la nuntempaj homoj plendas pri la kondiĉoj de la vivo kaj sin senkulpigas per ili, ili devas rememori pri la kolombo. La kolombo, kun multe malpli granda inteligenteco ol la homo, en sufiĉe pli malriĉaj eksteraj kondiĉoj, vivas pli puran kaj pli ĝustan vivon ol la homo, kiu sin opinias, ke estas kreita laŭ figuro kaj bildo de Dio.

La kondiĉojn de la vivo ni mem kreas. La homo estas pli forta ol la kondiĉoj, ĉar li mem kreis ilin. Ĉu tiu homo, kiu konstruas domon kaj faras ŝuldojn, ne kreas mem siajn kondiĉojn? Ĉu la ebriemulo, kiun la patrino naskis sana kaj fortika, ne ŝanĝis mem siajn kondiĉojn post 10-20 jaroj, ĉu li mem ne detruas sian organismon? Ĉu la kondiĉoj estas kulpaj? Tio estas natura kompreno pri la vivo. En ĝi kaŝiĝas tiuj venenaĵoj, kiuj hodiaŭ detruas la socion. Per tia kompreno oni hodiaŭ faras nur provojn kaj ni vidas ĝiajn rezultojn.

La nunaj suferoj de ĉiu homo estas naskitaj de antaŭaj kaŭzoj. Ĉar la naturo estas prudenta, ĝi konservas kun absoluta justeco la vivon de la Tuto. Do, ĝi tenas precizan konton pri ĉiuj malobeoj al la leĝoj, kiuj reguligas la tuton kaj restarigas la rompitan ekvilibron. Do, ĉiu individuo estas respondeca pri siaj agoj, egale ĉu li konscias kaj konfesas tion aŭ ne. Ĉiuj individuoj formas grandan organismon, la organismon de la granda kosma

Homo. En la kosma Homo nenio mortas, sed ĉio ŝanĝiĝas, en li estas senĉesa, matematika moviĝo de la vivaj estaĵoj, kiuj konsistigas lin. Li zorgas pri ĉiuj estaĵoj, kiuj formas lian organismon kaj konservas la leĝojn de la Tuto.

Do, la kondiĉoj, en kiuj ni vivas, la bono de unu popolo aŭ socio dependas de la individuoj, kiuj konsistigas ĝin. En ĉiu individuo, en ĉiu animo devas esti potenca strebo fariĝi prudenta. Unu el la plej gravaj kaj malfacilaj taskoj en la mondo estas — krei sian individuan vivon. Se kreiĝos la prudenta homo, tiam la familio, la socio, la prudenta homaro facile povas esti kreita. La nuntempuloj deziras unue restarigi la homaron, poste la socion, la familion kaj fine la homon. Evidente tiu vojo estas nelogika, malĝusta.

Ĉu ne estas klare: alvoku famajn muzikistojn, kiuj posedas sian arton kaj organizigu orkestron — en plej baldaŭa tempo ili donos perfektan plenumon. Poste alvoku homojn, kiuj nenion komprenas pri muziko kaj provu organizigi orkestron — estos nur grincado kaj bruoj. Tial la grandaj majstroj de la homaro tre atentis la individuajn animojn. Ili, kiuj konas la grandajn leĝojn de la tutplena vivo, scias ne nur, kiel ĝi manifestiĝas sur la tero, sed ankaŭ, ke la homaro ne povas restarigi per natura bruoj kaj vanaj frazoj. Ili ĉiam asertas, ke la unuo devas kompreni la leĝojn

de la parto kaj de la Tuto. Ĝi devas kompreni, ke la individua vivo ne estas sendependa de la kolektiva, do ne estas egale, kiel la homo manifestas sian vivon, kiun sola li povas regi. La homo, anstataŭ percepti siajn taskojn kiel aparta centro en la Tuto, forlasas sian centron kaj ekiras falsan vojon, por korekti la aliajn homojn, kaj li nur faras bruon.

Do, se ni ne komprenas la leĝojn de la racia vivo, kiuj reguligas la Tuton, ni ne povus restarigi ankaŭ nian vivon. La korekto de la individua vivo estas persona ago de ĉiu animo. Kelkiuj atendas savon de alia homo: alia homo ilin savu. Aliaj asertas, ke tiuj homoj, kiuj estas sur la tero ankoraŭ ne estas savitaj, sed tiuj, kiuj estas “en la transa mondo” estas savitaj. La ŝafo demandas: “Kiel estas miaj idoj, kie estas miaj ŝafidoj?” — “En la transa mondo ili estas, tre bone ili fartas tie”. Jes, en “la transa mondo” — enigitaj en la intestoj. Ni ne kredas tiajn konvinkojn. Ni ne volas nin fari ŝinkojn kaj nin sendi en “la transan mondon”. La transa mondo estas ĉi tie. Se la savo povus fariĝi en la transa mondo, la grandaj majstroj ne malsuprenvenus sur la teron. Ĉar ili venas sur la teron, ni devas esti savitaj ĉi tie. Ni volas esti savitaj tie, kie ni vivas.

Tiuj majstroj de antikvaj tempoj instruis la grandajn leĝojn, sur kiuj baziĝas la vivo de la individuaj

animoj, kaj la leĝojn sur kiuj baziĝas la universala unueco. Ili instruis en diversaj formoj kaj de diversaj vidpunktoj la leĝon de la Tuto kaj la leĝon de la partoj, la leĝon de la senlimeco kaj la leĝon de la limeco. La bono en la mondo asigniĝas de la unua leĝo — la leĝo de la Tuto. Aŭ dirite en okulta lingvo: de la leĝo de la Amo. La amo estas la unua elmonro de la senlimeco kaj portas en si la plenecon de la vivo. Kaj tiu vivo ampleksas ĉiujn animojn. Do, kiam ni parolas pri la amo, ni komprenas la plenecon kaj la unuecon de la Dia vivo, en kiu estas esceptita absolute la malbono.

La dua leĝo estas leĝo de la partoj, leĝo de la individuoj. El tiu leĝo, el la leĝo de la limeco, naskiĝas la malbono. La leĝo de la Tuto ampleksas la partojn, sed samtempe ĉiu parto havas apartan leĝon. Kiam la parto deziras trudi al la Tuto sian leĝon, naskiĝas la malbono en la mondo.

Tio estas nur supraĵe desegnitaj veroj, sed ili klare montras, kiel granda scienco estas la vivo, kiom prudente la homo devas konduki al la problemoj de la individua vivo, kaj al la problemoj de la kolektiva. La sociala problemoj, kiun hodiaŭ oni tiel akre diskutas en la mondo, estas problemoj, kiuj bezonas fundamentan konon de la du grandaj leĝoj: la leĝo de la Tuto kaj la leĝo de la partoj, kiuj kuŝas en la fundamento de la Tuta Vivo.

Perloj de la Majstro

Dio: La unika estaĵo al kiu la homo povas plej facile proksimiĝi — estas Dio.

Amo al la Majstro: La disĉiplo havas amon al sia Majstro. Tiam li havas eblecon akcepti tion, kion la Majstro donas al li.

La Fajro: La disĉiplo devas pasi tra fajro, por ke li puriĝu.

La ĝojo de la Majstro: Kiam la disĉiplo ĝojas en Dio, tiam ankaŭ la Majstro ĝojas pri la disĉiplo. Ĉar la Majstro serĉas ne sian gloron, sed la gloron de sia Patro.

La ĝusta vojo: La disĉiplo neniam dubas pri la Dia providenco. Li scias, ke la Vojo en kiu li eniris, estas ĝusta. Ĝi estas Vojo al Dio.

Prudento: La disĉiplo ĉiam pri-pensas siajn agojn. La prudento antaŭiras la Pacon.

Bono: La disĉiplo ĉiam havas eblecon fari bonon. La bono estas celo en lia vivo.

Konvinko: La disĉiplo pasas tra tento, por ke liaj konvinkoj estu provitaj.

Animo: Perceptu vin mem nur kiel animon! Konsciuj vin kiel vivan animon, kiu celas Dion.

Elteneo: La disĉiplo estas metita en fortaj travivaĵoj por ke li hardu sin en elteneo kaj vigleco de la konscio. Vivo sen intensaj travivaĵoj estas vivo de dormantaj animoj.

Elteneo: La disĉiplo devas elteni ĉion, kio okazas al li. Malantaŭ tio, kio okazas en la vivo, li vidas la agon de la senlima Amo, kiu unuigas ĉion.

Mistiko: Kiam la disĉiplo estas trovinta sian Majstron kaj kiam la Majstro estas parolanta jam al li, la disĉiplo sankte gardas la purecon.

Vigleco: La konscio de la disĉiplo devas esti vigla ĉiam! Ĉar en la vivo estas multe da malfruigintaj animoj, kiuj faras diversajn kaptilojn por allogi kaj deflankigi lin, se tio estas ebla.

* La fondinto de La Universala Blanka Frataro en Bulgarujo; ĉieliris en 1944.

Por Nia Botanika Ĝardeno

Ni danke kvitancas jene:

55. S-ro Novatius Vilmos, Csehimentszent, Hungarujo: semoj de 9-specaj floroj
56. S-ro C. de Azevedo, Vila Real, Portugalujo: semoj de Odoranta Latiro

Proskopio*, Determinismo, Antaŭdestino kaj Libera Volo

Felix Ortt

La tradukinto de tiu ĉi artikolo, s-ano D. Roskes (Nederlando) skribas: "S-ro Ortt estas eminentulo, vere saĝulo, atestimata (90-jara!) homo, tute sana vegetarano (kontraŭ-vivisekco), nefumanto, abstinentulo, filozofo, naturscienculo, parapsikologo, psikologo kaj pedagogo, redaktoro de revuoj". Nian vidpunkton pri la simila temo oni povas legi en la artikolo "Destino kaj Sorto" de s-ro Hidemaru Deguĉi, sur p. 164-169 de tiu ĉi numero. *Red.*

Jen la konceptoj, kiujn multaj rekonas kiel nedubeble veraj, sed kun kiuj sammulte da aliaj ne povas agordiĝi. La cerbolacigaĵo, pri kiu oni disputis dum jarcentoj kaj plue estos disputanta. La proskopio, la antaŭvido de okazaĵoj ekzistas, estas ne-neebla pruvita fakto. La plej rimarkinda ja en la formo de Dua Vido, kiun kelkaj naturdotitaj personoj spertas, kiuj spirite vidas estontajn okazaĵojn eĉ plej detale.

Jes, sed se tio ĉi estas fakto, tiam ankaŭ la estonto devas esti fiksita, tion diras nia simpla intelekto. Kaj nia racio konas la leĝon de Kaŭzo kaj Sekvo (kaŭzeca leĝo). De ĉio, kio okazos en la estonto la kaŭzo devas esti en la hodiaŭo (estanteo). Tiun ĉi fikson oni nomas "determinismo". La

fakto de la proskopio do devas pruvi la ĝustecon de la determinisma filozofio.

Tion, kion la filozofo nomas "determinismo", la eklezia-kredanto nomas "antaŭdestino". Estas Dio kiu kreis la mondon kaj fiksis kaj antaŭdestinis ĉion okazanta en ĝi. Ĉar nenio okazas sen la volo de Dio, diras la kredanto.

Sed la homo ja havas liberan volon — estas la ĝenerala opinio. Mi ja estas libera elekti inter du diferencaj eblecoj. Kiel do tio povas agordiĝi kun antaŭdestino aŭ determinismo, se la estonta okazo antaŭe jam estas fiksita.

Kaj la neeklezia homo diras: por tiuj, kiuj vere kredas, ke ĉio estas antaŭdestinita de Dio, ankaŭ estas antaŭdestinite, ke la plejparto de la homoj pekas kontraŭ la Dia

* Antaŭvido de okazontaĵoj. *Trad.*

Volo kaj estos inferkondamnita eterne. Kiel oni ja povas kredi al Dio, kiu estas amo kaj ĉiopova, kaj kiu kreas homaron je eterna infermalbeno?

Ne, diras la dogma kredanto, tion Dio ne faras. Estis Satano, kiu malhumile kaj libervole ekribelis kontraŭ Dio kaj kiu klopodas delogi la homaron al la malbono kaj la peko. Kaj ĉiu homo havas liberan volon, estas libera elekti inter Dio kaj Satano. Bedaŭrinde la plej multaj tute libere elektas malĝuste.

Se la afero estas jena, diras la liberpensulo, strangan Dion vi havas aŭ pli bone milionojn kaj milionojn da dioj. Ĉar via Dio ne estas ĉiopova, tiukaze li ne estus tolerinta aŭ kreinta tiujn, kiuj volas malbonon. Nun ĉiu homo per sia libera volo havas la povon kontraŭi la Dian volon. Ĉiu homo do mem estas dieto. Tio estas diaro pli-pagana ol pagana. Kaj se vi kiel kredanto persistas aserti, apogante vin sur bibliaj tekstoj, ke Dio tamen estas ĉiopova, tiam Dio certe ne estas amo, se li laŭ libera prefero la plimulton de siaj kreitaĵoj malfeliĉigas eterne.

Jes, por la Di-kredanto estas, por savi la Dian honoron, la nura elturniĝo: la libera volo aŭ libera elekto de la homo. Sed kiel tiu konfirmiĝas al la filozofio de la determinismo, kiu do pruvas sian ĝustecon per la fakto de la proskopio?

Certe, pri tiu cerbolaciĝaĵo oni

ankoraŭ ĉiam disputas. Tamen ŝajnas al mi ke ekzistas solvo. Ke tiu ĉi solvo evidente ĝis nun ankoraŭ ne estas trovita, laŭ mia opinio rezultas el la manko de preciza priskribo de la pridisputitaj konceptoj. Se tiurilate estos kontentigo, tiam preskaŭ trikvaronoj de la malfacilaĵo estos solvitaj.

“Proskopio” estas klara: estas la antaŭa vido de estontaj okazaĵoj.

“Determinismo” ankaŭ estas klara; estas la absoluta valideco de la leĝo de kaŭzo kaj sekvo (kaŭzeca leĝo). Do ke ĉio, kio okazas estis fiksita per la antaŭeco.

“Antaŭdestino” estas malpli klara pro la vorto destino. Tio ĉi enhavas la ideon, ke iu (en tiu ĉi okazo, Dio) ĉion kio okazas, do ankaŭ ĉiun maljustecon kaj malbonon, tiel “destinas”, tio estas: fiksas aŭ volis. Tio ĉi kondukas por ni homoj, nur atentantaj malgrandan parton de la tempo kompare al la miliardoj da jaroj, dum kiuj nia Universo, kaj la milionoj da jaroj, dum kiuj la homaro ekzistas — tio ĉi kondukas al ĉiuspecaj malsaĝaj kaj trorapidaj konkludoj. Ni do faros pli saĝe ne plu uzi tiun vorton.

Sed la plej gravan malkomparenon vekas la uzado de la vorto: “libera volo”; pli bone estus demandi al ĉiu kiu volas komenci konversacion pri “libera volo”, kion li intencas rilate al tiu esprimo.

Laŭ mia opinio, “libereco” estas negativa koncepto nome “ne ligita.”

Mi ne estas libera flugi al la luno, ĉar mia korpo estas ligita pro la pezoforto de la tero. Mi jes estas libera fari promenadeton, sed se mi estus malliberigita aŭ kuŝus en malsanulejo, mi tute ne estus libera fari tion.

Mi povas esti pli malpli libera de eksteraj cirkonstancoj, sed pri unu io mi neniam estas libera, kaj tio estas: mia propra karaktero.

Kiom ajn malamika iu estu je mi, kaj eĉ se mi havus apotekon kun venenoj je mia dispono, tamen mi ne estas libera veneni tiun malamikon, ĉar mia konscienco malpermesas tion.

Oni vidas el tiuj ekzemploj kiel malĝuste estas paroli pri libera volo. La homo ne havas liberan volon, sed havas *propran* volon. Kaj estas tio, kion intencas ĉiu, kiu diras: sed mi ja estas libera iri dekstren aŭ maldekstren, aŭ trinki tason da kafo aŭ ne. Tio dependas de li mem.

Jes, tion oni pensas. Sed oni preterlasas unu veron kaj tio estas, ke ĉiu ĉiam faras tion, kion li plivole faras aŭ almenaŭ plej ŝatas fari tion, kion li ne opinias tro malagrabra.

Ĉio povas okazi nur per unu maniero, kaj tio estas la maniero laŭ kiu ĝi ja okazas. Jen, ĉiutagaj klarigaj ekzemploj:

Mi ĉeestas festenon, kaj la gastigantino la duan fojon oferas al mi bungustegan pecon de torto. Estas vera bongustaĵo, sed mi ja

manĝis tiel multe, ke mi timas malordigi mian stomakon. Kion mi nun preferas, aŭ kion mi ne trovas tro malagrabra? Bridi mian apetiton? Aŭ poste vominkliniĝi? Oni faras tion kio estas plej grava.

Alian ekzemplon: kuracisto venas hejmen de sia pacientaro, preferas ekdormi. Sed — jen la alarmo de la telefono: ĉu li subite venu al malsanulo. Kion li preferas? Denove eliri aŭ la memriproĉon, se li ne farus tion. Lia volo entute dependas de lia karaktero kaj pro tio do tute ne estas libera. Kaj lia karaktero denove dependas de liaj denaskaj ecoj, parte do tiuj de liaj gepatroj, de lia edukado, de la medio en kiu li vivas ktp. Do estas sendube determinita.

La plej simpla maniero imagi al ni, kiel la proskopio estas ebla, ĉiu tamen povante agi en nekalkulebla maniero laŭ propra volo kaj krom tio povas okazi ĉiuspecaj neatenditaj okazantaĵoj — ekz. iu eklitas pro la glateco de la vojo kaj rompas al si la spinon, dum la cetera vivo estas paralizita, sekvo de tiu neatendita eklito — la simpla maniero por imagi tion al si estas kompreni la veron, ke ĉies vivokuro de la unua ĝis la lasta tago de lia vivo povas pasi nur laŭ unu maniero — kaj estas tiu maniero laŭ kiu ĝi efektive pasas. Kiam iu mortis kaj lia biografio priskribas tute laŭ la vero ĉiujn detalojn de la vivo de la mortinto, tiam tio ĉi do estas la nuro, kiu

povis okazi al li, ĉar ĝi pasis tiamaniere kaj ne alimaniere.

Nun mi scias ke la proskopio ekzistas. Ni do povas imagi al ni ke iu proskopio jam ankoraŭ dum la vivo de tiu alia persono antaŭvidas, kiel post ekz. 50 jaroj la biografo estos priskribanta ties vivon. Li do antaŭvidas kiel ĉiuj propraj (aŭ kiel oni diras "liberaj") voldestinoj de tiu persono pasos en lia cetera vivo, kaj ankaŭ kiel ĉiuj tielnomitaj hazardoj finiĝos.

Kaj fine: Inter proskopio, deter-

minismo, antaŭdestino unuflanke kaj "libera volo" aliflanke tute ne ekzistas kontrasto. Nek estas cerbolacigaĵo.

La kaŭzeca leĝo estas pensaksimomo. Se estas konsiderinda iu celo rilate al la kaŭzeca leĝo oni trovas sin en spirita regiono.

Gravas nur ke oni konvinkigas ke la leĝo de kaŭzo kaj sekvo (kaŭzeca leĝo) validas sammulte en spirita kiel en materia regiono.

Trad. de *D. Roskes*

Jubilea Kongreso de Japanaj Esperantistoj



La 43-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj por 50-jara Jubileo de Japana Esp-Movado okazis en Tokio de la 10-a ĝis la 11-a de novembro, 1956. Ĝin aliĝis 738 personoj, el kiuj ĉ. 400 ĉeestis. La detalan raporton oni povos legi en la sekvanta numero de nia gazeto.

La foto montras la Inaŭguran Solenon de l' Ora Jubileo, kiam s-ro Zenmaru Toki salutas kiel prez. de la Tutlanda Plenumkomitato de la Jubilea Kongreso.

Japan-Faka Ekspozicio altiris Admiron

ĉe XVIIa HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Barcelona, 24-29 de julio 1956

En Hispanujo la Esperanto-movado vigle reffloras. En Barcelona okazis la 17-a Hispana Kongreso de Esperantistoj dum 24-29 de julio. Ĝin partoprenis 600 gesamideanoj, inter kiuj sin trovis 100 geeksterlandanoj.

Inter la diversaj okazintaĵoj de la Kongreso speciale menciinda estis la starigo de PROPAGAND-EKSPOZICIO aranĝita de la FILATELIA SEKCIO de Hispana Esperanto Federacio.

Ĝi okazis en la arta kapelo de la malnova Hospitalo *Santa Cruz* (Sankta Kruco), kiu situas meze de la urbo Barcelona kaj kie la Urbestro regule organizas diversspecajn ekspoziciojn.

La inaŭguro de l' Ekspozicio okazis la 25-an de julio posttagmeze kun la ĉeestado de la urbaj aŭtoritatoj, la Estraro de H. E. F. krom multnombraj gekongresanoj.

La grava Ekspozicio enhavis filatelian materialon pri Esp., speciale poŝtstampojn, glumarkojn, ktp.; turismbroŝurojn en la internacia lingvo; la nuntempajn Esperantaj gazetojn; Esperantan verkaron. Oni ankaŭ povis admiri tie preskaŭ 800 infandeseĝnaĵojn, kies kolekto bone pruis al la publiko la efektivecon de nia kara helpilingvo.

Sed specialan komenton ni deziras dediĉi al la Japana Sekcio de la Ekspozicio. Oni instalas ĝin por montri al la ĝenerala publiko ke dank' al Esp. la mondo estas tre malgranda por ni esperantistoj, kaj por tiu celo la aranĝantoj elektis la malprok-

siman sed ĉiam interesan Japanujon.

Multaj japanaj samideanoj fervore respondis al nia alvoko kaj sendis al Barcelona la taŭgan kaj belan materialon. La pedagogia materialo ege ravis la okulon de la hispanaj geinstruistoj, kiuj dum horoj rigardadis la belajn librojn uzatajn en la japanaj lernejoj kaj entuziasmiĝis antaŭ la celtaŭgaj kaj meritplenaj sistemoj de lernado praktikataj en Japanujo. La eldonistoj konstatis ke nek en Hispanujo nek en la tuta Eŭropo oni presas tiel precize kaj bele.

La broŝuroj pri la eksplodo de atombomboj ankaŭ multe interesis. La japanaj tipaj ventumiloj, kimonoj, almanakoj, ktp., ĉio estis kurioze rigardata de la vizitantoj.

Resume: pro la sindona helpo de la japanaj gesamideanoj ni bone propagandis Esperanton kaj dank' al Esp. ni bone konigis Japanujon al multaj barcelonanoj.

La tuta materialo estas zorge konservita kaj la Ekspozicio rondiros nian landon. Ni havas certecon ke ĉie ĝi havos la saman grandan sukceson kiel en Barcelona.

Ni deziras ankaŭ profiti la okazon por publike danki al ĉiuj, kiuj sendis la materialon; ilia helpo vere estis kaj estos fruktodona. Reciproke ni restas je la dispono de ĉiuj.

Evaristo Gil,
Sekretario de la Filatelia
Fako, H. E. F.



Centra vidaĵo de la Japana Fako, ĉe la Esperanta Ekspozicio, Barcelona

Orienta Vizaĝo

La infana sceno sur desegnaĵo vere estas internacia, ĝi povus okazi en iu ajn lando: ĝi prezentas kelkajn infanojn, ludantajn al la "Blinda Kokino". Sed la vizaĝo de unu el la infanoj estas orienta, ĉar estas supozeble ke la ludo okazas en Japanujo. Mi rigardas ĝin en bela albumo de muziko kaj kanto por la infanoj eldonita en tiu orienta lando.

Poste mi vidas ankaŭ aliajn lerneajn librojn japanajn: pri matematiko, literaturo, nacia skribado, orienta kaj okcidenta arto, geografio, ktp. Pli ol du cent libroj malsamaj, de unua kaj dua grado. Ili estas ĝentile montrataj al mi de s-ro Evaristo Gil, sekretario de la Filatelia Fako. La verkoj estis ekspoziciataj okaze de la XVII Nacia Kongreso de Esperanto kiu ĵus

okazis en Barcelona. S-ro Evaristo Gil estis la aŭtoro de la menciita ekspozicio.

— Kiel vi povis ricevi tiom da verkoj, mi demandis.

— Mi skribis kelkajn poŝtkartojn al miaj japanaj korespondantoj sciigante al ili la ideon: tiea revuo presis la ideon, lokaj eldonejoj — la Osaka Ŝoseki, la Futaba ktp. entuziasmiĝis kaj jen la grandioza rezulto kiel vi konstatis.

Vere, admirindaj estas la verkoj por la elementaj lernejoj, kiujn mi ekzamenis kaj trarigardis. Malmultaj literoj kaj multaj ilustraĵoj, ĉar tiel la afero estas pli facila por la leganto malgranda aŭ des pli bona por la rigardanto.

Ĉiuj tiaj abundaj ilustraĵoj estas artisme presitaj en belegaj koloroj: tio ankaŭ pruvas la delikatan lertecon de la japanoj. La enmeto de unu ĉefa objekto en la fono de diversaj detaloj multe faciligas la komprenadon.

Estas strange, ke la knaboj, kiuj aperas en la verkoj, ne vestas sin en kimono, sed en okcidenta vestaĵo. Cetere, ĉiuj japanoj, kiuj aperas en multegaj bildoj, portas eŭropan kostumon. Ili estas jam enmetitaj en la universala rondo, ne nur por ludi al la "blinda kokino" kaj por havi ludilojn kun la "Donald" ansero, sed por ilia spirito ankaŭ.

— Ĉu vi ricevis nur librojn?

— Ankaŭ diversajn aliajn japanajn aĵojn. Inter ili la granda karmo "Koinobori" (flugrubanda fiŝo), du metrojn longa, kiu ankaŭ estis montrata ĉe la ekspozicio.

— Pri kio la karmo?

— Ĉar ĝi estas simbolo de la triumfo de la volo kontraŭ ĉiaj baroj. La karmo estas fiŝo kiu ne vane naĝas kontraŭ torenton de akvofluo.

Kaj tiu simbolo — mi pensas — amikoj, por konkludi — estas aŭtentike japana. Estas simbolo de la popolo, kiu kapablas lukti kontraŭ la malfacilaĵoj, kiam ili alvenas, kun rideto sur la lipoj kaj konstanteco en la animo.

Skribita de ĵurnalisto

Domingo de Fuenmayor

Elhispanigis *Ramon Malera*

El *Diario de Barcelona*, (Barcelona gazeto) datita je 9-8-1956

Anoncetoj

NICOLAS L. EŒCARTIN, strato Castillo, 12, 19, izqda. ZARAGOZA (Hispanujo), serĉas korespondantojn en Japanujo, Turkujo, Grekujo, Persujo, Cejlono, Izraelio, Egiptujo, Hindujo, Indonezio kaj ĉiuj neeŭropaj landoj, por interŝanĝi tradukojn, verkojn, revuojn k.c. pri psikaj, religiaj kaj filozofiaj aferoj. Okaze ankaŭ korespondos pri ĉiaj aferoj

Mondaniga Deklaro de du japanaj komunumoj

La vilaĝo *Kokufu* kaj la urbo *Tenri*, proklamis sin mondanigitaj kaj publikigis la jenajn Deklarojn la 27-an kaj 28-an de sept., 1956, respektive:

KOKUFU-MURA (Nomi-gun, Iŝikai-ken): Konfirmante la celadon de la Movado por Mondfederacio, la vilaĝo de Kokufu deklaras ke ĝi strebos por starigi la eternan pacon manon en mano kun la popoloj de la tuta mondo.

TENRI-ŜI (Nara-ken): Tenri*, kiu antaŭ nelonge inaŭguris la urbiĝon kiel la urbo de Religia Kulturo, nun deklaras sin 'Mondurbo' kaj laboros por la bonfartigo de la tuta homaro kaj por la starigo de mondpaĉo.

*) La nomo de la urbo *Tenri* devenis de Tenri-kjo, plej granda ŝintoisma sekto, kies Centro sidas en la urbo. La preskaŭ tuta urbo estas sub ĝia influo. Jen kial oni deklaras: la urbo de Religia Kulturo. Kune kun ĉi tiuj Japanujo nun havas 19 mondanigitajn komunumojn.

kaj interŝanĝos poŝtmark., bildkartojn, tutkolorajn fotografaĵojn ktp. Ne pre respondos.

LETERVESPERO ĉe f-ino Janine Priset, 35 Rue Pierre Curie, Saint-Pierres-Corps (I. et L.), Francujo.

S-ro Bilinsky Jerzy, *Brodonico*, ul. Grunwaldska 6 m 3, woj. bydgoskie, Pollando, deziras korespondi kun samideanoj en la mondo, precipe en Japanujo, pri ĉia temo.

Eŭgeno Matkowski (Pollando)

La hombevo

*Vojo peniga, vojo sen celo,
voj' de turmentaj baroj plenplena,
voj' de bataloj, voj' de ribeloj,
plena de koto voj' abomena,
vojo nomata vivo-ekzisto,
vojo de l' griza hom' — laboristo.*

*Vcjo kaj homo — viv' kaj sufero,
peza laboro, laco silenta...
kien ci iras, griza mizero,
ci ribelema hom' malkontenta?
Kien ci rampas, muta rezisto,
sterko de l' vivo, ci — laboristo?*

*Kie ci vagas, kien ci iras
ci — de la Vivo vano kaj nulo?
Kion ci volas, kion deziras?
Panon kaj Veron?? Ho, naivulo!
Veron ci trovos eble ĉe Kristo
aŭ ĉe diablo, ho, laboristo!*

*Krist' kaj diabloj: vundoj kaj... bruloj,
reg' de ĉielo, reg' de infero...
eble ĉe tiuj du potenculoj
iam ci trovos iom da Vero,
se ne ĉe Kristo, do ĉe Mefisto
serĉu la Veron, ho, laboristo!*

*Tamen neniam iajn la verojn
sercu, naiva homo, ĉe l' Homo,*

*homo disbatis en atomerojn
ĉian plej etan veroatomon,
Veron mortigis bruta viv-pisto,
Ver' jam ne vivas, ho, laboristo!*

*Homo mizera, homo malsata,
ci, kiun kaptis vorto-allogo,
sciu, ke ĉio Vero nomata
estas nur simpla tromp' koj mensogo,
sciu, ke homo estas trompisto
kaj mensogulo, ho, laboristo!*

*Homo kreante falsajn ideojn
stultajn vivojn igas cin krie,
li cin devigas fosi tranĉeojn,
kie en propra sang' agonii,
kiel faŝisto aŭ komunisto
povu trompito — ci, laboristo!*

*Homo naiva, homo mizera,
griza, nesaga homo malsprita,
oni cin nomas "homo libera"
cin, kiu estas bovo jungita,
bov' sur de bovoj longa bovliso,
moke citita: Bov-laboristo.*

*Kial do ĉiam via bovkoro
per ribelema brulas kaj bolas?
Nomo: Bovhomo... estas honoro,
kvankam nom' Bovo nure simbolas,
kion ci volas grandpesimisto,
malkontentulo, ci — laboristo??*

*Regi ci volas, cari ci volas,
volas ci estri, stari ĉe l' trogo?
Lasu vanrevojn! Ver' malkonsola,
Vero dunoma: Trompo-Mensogo
monstran tiranon: Drak-antikriston!!*

FORUMO

Religio kaj Scienco*

S-ro Daglio skribas pri tio, kion li neniam studis kaj esploris, kaj faras aserton sur la bazo de siaj antaŭ-konceptitaj ideoj pri la religio.

Dogmon, ceremonion, miraklon, mi ankaŭ ne ŝatas, sed tio estas ne tial, ke mi abomenas la religion. S-ro Daglio en lia malcedema materiismo jesigas ke "unu el la dogmoj estas kredigi la stultaĵon de la senmorteco de spirita animo, kiun ekspluatita la unuaj sorĉistoj (?) kaj perfektigis iliaj posteuloj, la klerikaro". Nu! Pri la fakto ke la klerikaro ekspluatita kaj ekspluatita, ni ja scias, sed kio ŝajnas esti ne ĝusta, estas diro de s-ro Daglio ke tiu heredaĵo de la homaro, la kredo je la Dio-ekzisto kaj je la spirita vivo, estas dogmo. Dogmo estas kvazaŭ religia dekreto, kiu blinde jesigas certan aferon. Sed la anima senmorteco neniel estas dogmo, sed tre natura fakto konata jam de la tempo de nia praa popolo ĝis la nuntempa popolo. La malsameco inter ambaŭ konceptoj estas granda.

Religio, laŭ nia verkanto, "estas la ago de ligi, jungi naivulojn al la ĉaro, sur kiu komforte sidas profesiuloj, t. e. ĉiuspecaj pastroj." Ke la pastroj profitas, utiligas, uzas religion kiel okupon, vivrimedon, kaj metodon por konkero de materiaj havaĵoj, mi ne dubas tion, sed laŭ mia opinio, *religio* devenas de la latinlingvo *relicare*, t. e. denove ligi, kunigi homojn kun Dio, kaj ĝuste tio ĝi estas kaj devas esti.

Pri "mirakloj". En la komuna dirado miraklo estas iu supernatura fenomeno, kiu okazas kontraŭ la leĝoj de naturo. Mirakloj ja ne ekzistas. Sed ĉu la homoj en la nuna etapo de sia evoluo povus pretendi ke ili jam plene konas la leĝon de la naturo? Dio ne kreis la naturajn leĝojn por poste malvalidigi ilin. Se certaj okazaĵoj aspektas nune kvazaŭ miraklaj fenomenoj, tio estas ĉar la plej granda parto de la homaro ankoraŭ ne posedas la sufiĉan sciencan konon por komprenigi ilin, nek provas malkovri la kialon.

Mi iam estis materiisto, sed post la studado kaj esplorado pri ĉio kio estas reala kaj miraklema, mi atingis la konkludon ke la vivfilozofio ne havas la bazon sur la scienca materiismo. Verdire, mi hodiaŭ scias nenion. En mia juneco mi lernis ke la plej malgranda ero de la materio estas molekulo, poste ekaperis atomo, kiun oni instruis jam nedividebla; hodiaŭ ni scias ke ĝi estas dividebla kaj liveras teruran energion; post nelonge oni scios ke la atomo konsistas el energiaj ŝarĝoj forte kunigitaj; tiam ĝi ĉesos esti materia ero kruda kaj oni esploros la fonton de astraj energioj kaj aliaj elementoj ankoraŭ nun nekonataj, kaj la materio perdos sian proprecon. De kie devenas tiu energio? Kiu kunigis ĝin? Ĉu Hazardo? Ĉu Superega Forto? Ĉu Dio? Hazardaĵo ne ekzistas, do la aŭtoro de tiu kunmetaĵo sole povas esti Dio, kvankam tiu Estulo estas nomata per pluraj nomoj kaj oni komprenas lin laŭ diversaj formoj. El la ĝisfunda lernado de la scienca materiismo oni vole-nevole transiros al tiu de la

nekonataj fortoj kaj oni ekkonos pli kaj pli la neŝanĝeblajn kaj ĉiamajn leĝojn de Dio kaj la mirindaĵon de la spirita mondo, per kiuj Dio laboras en la mondoj tra la astra spaco. Tia estas la evolucio. Ĝis tiu tempo alvenos, tiuj mirindaj leĝoj estos konataj nur kiel miraklaĵoj, stultaĵoj, sorĉartaĵoj.

Diras s-ro Daglio ankaŭ ke la nuna socio estas en malordo, kiel en malordo estas la tuto de la ŝtatoj sur la terglobo. La kulpo de tio ne kuŝas ĉe tiuj, kiuj kredas, sed nur ĉe la religiestroj kaj interesuloj, kiuj avidas bonvivadon, monon, socian pozicion ekspluatante la naivulojn. La solvo tamen ne estas ke ni iru sur la vojon de la absoluta materiismo. Se homoj evoluus kiel homoj kiuj klopodas utili al aliaj kaj ne esti servataj, se ili helpus unu la aliajn en frateca kompreno, la mondo ne estus "valo de larmoj" kiel skribas s-ro Daglio.

Evangelia diraĵo: "Pere de fruktoj la arbo sin konas", do lasu s-ron Daglio kun liaj ideoj kaj oni vidos kia arbo estas lia.

Pli belan klarigon faris s-ro Hidemaru Deguĉi en la jeno: "La spirito de homo devenas de Dio kaj la korpo estas Lia vivanta kapelo". Alia, "Kiel fajrero lumigas ĉirkaŭaĵon en mallumo, tiel same se oni ekbruligos al si la torĉon de Dikredo en sia interno, oni facile trovos antaŭ si facilan elirvojon al mondo pli bela kaj lumata."

Ŝatata de mi estas ankaŭ s-ro Teruo Mikami pro lia bonega esperantigado tre komprenbla al la esperantistoj de okcidentaj landoj. Fine Esperanto estas ilo de ligado kaj ne de malligado. Gratulojn al s-ro T. Mikami!

La aliaj fakoj de OOMOTO ankaŭ estas bonaj: tion oni vidas per la en ĝi pritraktataj aferoj religiaj, filozofiaj, kultaj kaj informigaj. Ke Dio benu la laboron por la pli-klerigo kaj pli-disvolvigo de la

homaro estas miaj sinceraj bondeziroj.

J. C. Arruda Filho
S. P. Brazilo

*

En la Maj-Junia numero de via ŝatata gazeto mi legis la kontribuojn de C. Daglio en kiu li skribis: "Religio kostis al la homaro larmojn kaj sangon laŭ riveroj, sed ĝi ne solvis la du problemojn de l' homaro: forigi krimfarojn kaj forigi militojn. Ĝi eĉ kreis tiajn: historio pruvas. Do ĝi estas pasivaĵo en la budĝeto de l' homaro."

Laŭ mia humila opinio; tio ne estas la religio sed la grava manko de vera religio, kio kreas krimojn kaj militojn. La nuntempa mondo enhavas multajn tiel-nomatajn kredantojn religianajn, sed bedaŭre multaj ne estas farantoj kaj restas senfara. Kredo sola ne sufiĉas. Foje mi renkontas homojn, kiuj ŝajnas esti tre entuziasmaj, ekzemple, pri la lingvo Esperanto, kaj parolas rilate al la granda valoro diversmaniere pri internacia kompreno; sed ili nenion faras, kaj poste estas tre surprizate ke la lingvo ne progresas tiel rapide kiel ili antaŭe pensis. Kiel ili povas atendi progreson se ili estas tiel malviglaj? Estus tre malsaĝe diri ke Esperanto estas priresponda pro la malaktikveco, Antaŭ ne longe mi pripensis kaj studis la instruadon de Jesuo Kristo en la Nova Testamento. Fine mi konkludis ke tia instruado ne povas konduki al krimoj kaj militoj, konsekvence mi dubas ĉu la aserto de S-ro C. Daglio estas prava. Li ankaŭ skribas — "religianoj kredas ke tiu ĉi mondo estas 'valo de larmoj' kaj nur post morto ili bonstatos". Mi devas diri ke kvankam mi multe vojaĝis kaj longe vivis mi ankoraŭ ne renkontis tiajn religianojn.

James R. Miller,
Staffordshire, Britujo

* Rilatas al la samtema artikolo de la itala s-ano, s-ro Daglio, aperinta en n-ro maj-jun. de OOMOTO, 1956. Sekvas multaj aliaj, kiuj malsame opinias ol s-ro Daglio.



★ EZOPA SAĜO, sepdeksep fabloj de Ezopo verse reverkitaj de K. Kalocsay, kun 29 vinjetoj de B. HAMBERG. Eldonejo Koko (Komuna Konversacia Klubo), Randbølvej 4, Kopenhago F, Danlando. 127 paĝoj (13 × 21 cm.), Prezo: 9 d. kr. aŭ \$ 1.30, aŭ 5 n. guld.

Estas nefacile elekti unu, do mi citu mallongan hazarde: *La aglo kaj la sago*.

La aglon murde trafis piko de sag' plumita, kaj li veas: "Ho jen, mi ne de malamiko, sed de la propra plum' pereas." Popolon falĉas armtekniko, sed kies manoj do ĝin kreas?

Kia saĝo de Ezopo ke ĝi estas adapt-ebla al ĉiuj epokoj kaj lokoj! 77 tiaj fabloj de l' eterna saĝo estas verse reverkitaj en esp-a formo plej konciza kaj klara. Per la verko de Kalocsay Ezopo estas laŭre eternigita en Esperantujo.

La 15-paĝa enkonduka poemo pri la epizodoj de la vivo de Ezopo en si mem estas legaĵo interesa. Rimarkoj kaj Notoj ĉe la fino de l' libro donas bibliografian skizon pri la Ezopaj fabloj.

"Ezopo fariĝis komuna trezoro de ĉiuj popoloj. Ne nur de la Eŭropaj: Ekzistas tradukoj en irana, hinda, japana, abisena ktp. lingvoj (p. 120)." Jes, multaj el la

Ezopaj fabloj estas al ni tiel intimaj, ke ni memoras kelkajn nur kiel japanajn. Mi ĵus rimarkis ke la japana aŭ ĉina proverba esprimo, "La montego tremmuĝis, nure muso elfuĝis," devenis de *La akuŝanta monto*.

Sed en la japana, ni ne havas kolekton de l' Ezopaj fabloj en versoj. Kaj se iu japana poeto iam transmetus ĝin en versojn, mi estas certa ke li evitos malfacilajn vortojn, kiajn mi trovas en Ezopa Saĝo. Li preferus uzi ekz. *nei, teda* anstataŭ *negi, pigra* en

vi, vulpo, negi ne skrupulas
ŝtelon faritan preskaŭ certe (p. 40)
Nomis la leporo moke
la testudon pigra, lama (p. 85)

Tiel, sufiĉe multaj el la 46 vortoj klarigitaj en Glosaro estas anstataŭigeblaj per pli facilaj komunaj vortoj. La fabloj estas por "popolibro": infanlegaĵo.

Pri metriko, mi trovas ke Kalocsay oftege difektas la regulan ritmon. Ekz. *La rano volas reĝon* (p. 31) konsistas el 22 versoj, el kiuj 11 estas sestrokeaj kaj la ceteraj estas sestaktaj nur pro enŝoviĝo de po unu anapesto. Tamen, ses el tiuj 11 anapestoj oni povas igi trokeaj simple per apostrofado de *o* kaj *a*.

Du-tri rimitaj vortoj estas iom sencotrudaj. Ekz. *metis* (p. 84), *kariero* (p. 86), *sendis* (p. 98).

Teknika miso haltiĝis min sur p. 83, kie du versoj — eble — forestas inter la 3-a kaj 4-a versoj; sur p. 90 la unua verso mankas al la 3-a strofo.

Cetere, la libro estas bonega kaj belega. La vinjetoj de Hamberg estas tre originalaj. Ĉiuj herooj — bestoj kaj birdoj — estas reliefigitaj per delikate cizelitaj linioj kaj elaste kurbaj strekoj, nuancitaj per spaco blanka aŭ nigra. En liaj desegnaĵoj mi trovas skulptistan talenton de la miniaturarto. *Teruo Mikami*

★ La NIGRA SPARTAKO: Originala novelo de Geraldo Mattos, eld. de Esperantista Libro-Instituto (Poŝtkesto 2552, Curitiba, Parana, Brazilo). Formato: 11.5 × 16 cm.; 75 paĝoj; prezo: 25 UL-Steloj. (Iom dubinda prezo: por tiu egala valuto japanoj povas aĉeti en la lando multe pli ampleksan libron ol ĝin.) Mendebila ankaŭ ĉe Kultura Kooperativo de Esperanto, Caixa Postal 3667, Rio de Janeiro, Brazilo.

La nomo de la verkinto Geraldo Mattos jam fariĝis familiara en Esperantujo kiel juna poeto en Brazilo. Li kulturas ankaŭ la prozan kampon kaj montras tion en tiu ĉi volumeto.

"En tiu parto de Afriko, kie kuŝas la suno, iam vivis la potenca reĝo Kam Golo, mastro de la bravaj negroj en Paran Atan," tiel komenciĝas lia rakonto pri la epizodo el la Brazila historio en la fino de 17-a jarcento. Kam Golo, afrika tribestro, por venĝo kaj pro amo al bela mulatino postkuras la arabajn komercistojn kaj veturas en Brazilon kiel unu el la sklavoj. Gvidante aron da sklavoj li poste fondas fortikajan palmovilaĝon por defendi ilin kontraŭ la atako de blankuloj, kaj fine pereigas kun sia amata mulatino Mariana antaŭ la malamiko de la brava komandanto Georgo Dominiko.

Impresaj estas la vortoj de Uganga, sorĉisto kaj subulo de Kam Golo. Post la ruiniĝo de sia vilaĝo sub la mano de blankuloj, li veturas Brazilon por serĉi la mastron kaj fine atingas la palmovilaĝon. Li admonas la mastron kiam ĉi tiu mortas: "Atentu la parolon de via patro, venanta el la tombo. Vi estas la unua, kiu provas montri al la mondo, ke la negro estas homo forta, inteligenta kaj sentema, se nur la cirkonstancoj permesas al li disvolvi tiujn kapablojn libere kaj spontane; vi tamen ne

venkos, mia filo! Vi sole plantos la arbon de nia libereco, sed ĝi fruktos en alia epoko malproksima de la nia, kiam la mensa evoluo ne toleros plu sklavecon, ne nur homan, sed eĉ bestan. Vin frakasos la amaso de viaj malamikoj, sed ne timu: batalu ĝis la fino kaj ĉe la penso pri senkuraĝeco pensu, ke mi maljuna kaj jam kaduka venis al vi partopreni vian verkon, certa tamen pri ĝia malsukceso!"

Tiu ĉi proza epodo estas interesa pro la brava kaj romantika flankoj de la heroo, kvankam tragedia.

La titol-nomo, Spartako, devenis de la sama bravulo, kiu simile al Kam Golo gvidis sklavojn por ribeli kontraŭ Romo en 73-74 a.K.

La stilo estas tiel bona kaj facila ke eĉ komencantoj povas tralegi senpene. Malmultaj preseraroj estas troveblaj, kiuj tamen ne tre gravas. Mi ĉi-okaze gratulas al la brazilaj samideanoj, ke ili fondis "Esperantistan Libro-Instituton", kaj esperas ke ili senĉese liveros al ni bonajn esp-literaturaĵojn. *J. Umeda*

★ ESPERANTO, malgranda german-lingva prospekto pri Esp.; eld. de Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, Germanujo; formato: 20 × 12 cm.; 32 paĝoj; prezo: ne indikita.

Sur la kovrilo estas skribita: *Esperanto Tor zur Welt* (Enirejo al la mondo). Sur la dorso troviĝas mallonga biografio de Zamenhof kun lia busto bele farita de esperantisto-skulptistino Frida Christaller.

Legante la enhavon ĉiu lernos kial Esperanto estas "la enirejo al la mondo", kiom necesa estas mondlingvo, kiel interesiĝis UNESCO kaj aliaj organizoj pri Esperanto, kiel facile ellerni Esp-on, kaj kiel facile oni povas per ĝi kompreni unu la alian, ktp. Oni skribas, "Vi pensu ĉiam tion: Lingvoj dividas, Esperanto kunligas".

(laŭ mia esp-igo).

Multaj paĝoj estas por la reklamo de vortaroj, libroj, kantaronoj, insignoj, afiŝoj, poŝtkartoj kun Zamenhofaj bustoj, ktp. Ĉiuj eldonitaj en Germanujo.

Troviĝas ankaŭ la katalogo de ĉiuspecaj Esperantaĵoj de la mondo.

Tiu ĉi broŝuro bele presita sur luksa papero estas nature por germanoj. Sed, ankaŭ por la ne-germanoj, kiuj komprenas germanan lingvon, ĝi estas ne nur utila, sed bonega propagandilo ĝenerale. Mi deziras, ke ĝi trovos sian vojon en la mondon kaj aparte en Germanujo ĝi stimulos revigli la Esp-movadon!

Z. Kacura

★ GEOGRAFIA REVUO, N-ro 1/I (Majo 1956), organo de la Internacia Geografia Asocio. Redaktoro: Tibor Sekelj. 32 paĝoj (16.5 × 23.5 cm.). Abonprezo por 1 jaro (minimume 4 n-roj): \$ 1. aŭ egalvaloro, pagebla al la konto de Geografia Revuo ĉe la "Administra Oficejo" de UEA.

Ĉiu artikolo estas ne nur scienca, sed eĉ amuza per multaj fotoj — por "koni la mondon" necivilizitan, aŭ antikvegan, aŭ polusan. "Esplorvojaĝo tra Amazonio" de la redaktoro estas tre interesa. Rekomendebla al ĉiuj.

*

Libroj ricevitaj po 1 ekzl.

★ SENNACIECA REVUO, N-ro 84, Jaro 1956, 57-paĝa. Prezo 200 fr. fr., 0.60 dol., aŭ 2 gld. Eldonis SAT, 67 avenue Gambetta, Paris 20, Francujo.

★ ELEKTITAJ PRELEGOJ 1949 — 1954, Internacia Somera Universitato — Dua Volumo. 12 prelegoj en 104 paĝoj. Redaktita de prof. d-ro Ivo Lapenna. Eldonis J. Muusses, Purmerend, Nederlando. Prezo: f 3.90 aŭ \$ 1.10.

★ JARLIBRO DE U. E. A. 1956, *Unud* Parto: kutima formato: 11 × 15 cm.; 319 paĝoj. Liverata al Individuaj Membroj de U. E. A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

★ FACILA SEMAFORO ESPERANTA, aplikebla al lingvoj angla, ĉina, franca, germana, hispana, itala, japana, malaja, portugala, rusa, kaj aliaj; verkita de s-ro Joŝiroo Jamaguĉi; eld. de La Orienta Stelo, 4097, Kamicuruma, Sagamiharamaĉi, Kanagaŭa-ken, Japanujo; formato: 13 × 18.5 cm.; 21 paĝoj; enlanda prezo: ¥ 60 + 10 (sendkosto), poreksterlanda prezo: 1 ŝil. 3p. angla aŭ egalo afranko 3p., aŭ 3 resp. kup., afrankite; rabato: 20 % por pli ol 20 ekzl.

★ RAPORTO PRI LA DUA INTERNACIA KONFERENCO DE ESPERANTISTOJ, aranĝita de Internacia Studenta Esperanto Unio; stencile multobligita kaj eldonita de Det Internationale Forlag, Boks 136, Kopenhago, Danlando; formato: 21 × 30 cm.; 10 paĝoj; prezo: 5,00 d. kr.

★ EDELVEJSO, parnaso de s-ano Masao Niŝimura mortinta 1940; eld. de Japana Esp-a Librokooperativo, Nakacu-hamadoori 2-20, Oojodo-ku, Osaka, Japanujo; formato: 13 × 18 cm.; 213 paĝoj; prezo: ¥ 400.

★ SCIENCA REVUO, n-ro 1-a (Vol. 8-a) de oficiala organo de I. S. A. E.; reeldonita de J. Muusses, Purmerend, Nederlando, Ĉironumero 15062; formato: 15 × 21 cm.; 40 paĝoj; jarabono: Ned. gld. 5. —, \$ 1.50, aŭ egalvaloro.

★ LA DEK BILDOJ DE BOVPAŝTADO, libreto de Zen-budaismo; trad. el ĉina lingvo de Kei Ŝibajama; eld. de Bukkaŝa, 1930; formato: 13 × 16 cm.; 22 paĝoj; stoko de nur 20 ekzl. Havebla ĉe La Redakcio de OOMOTO por 1 resp. kup.

Parolas la Legantaro

★ S-ro *W. Bicklej*, Broken Hill, Norda Rodezio

Via ĉarma gazeto estas la plej bela kaj la plej interesa el ĉiuj esp-aĵoj, kiujn mi ricevas.

Ĝia orienta aspekto pliiĝas la intereson kaj valoron al okcidentano, kiu laboras en Afrika regiono ankoraŭ iom primitiva.

★ S-ro *Frantisek Pytloun*, Podebrady, Ĉeĥoslovakujo

Ĵus mi ricevis vian belan gazeton OOMOTO, denove post longa tempo. Foje ĝi estis mia monata ornamo sur mia tablo; kiel mi bedaŭris poste, ke ĝi ne plu venas, kaj jen ĝi alvenis, kia ĝojo! La gazeto estas riĉenhava kaj ĉiu povas elekti ion por si. Ĉefe tre plaĉas al mi la bela Zamenhofa lingvo en kiu la gazeto estas skribita.

★ S-ro *Eugeno Matkowski*, Sosnowiec, Polujo

Tute hazarde enfalis en miajn manojn unu numero de "OOMOTO". Mi estas ravita de ĝia enhavo! Mi tre deziras esti via kunlaboranto. Ĉu vi konsentas? Mi estas esperantlingva verkisto kaj ĉi-kune mi sendas al vi mian versaĵon "La elekto de rom-papo" kun granda peto aperigi ĝin en "OOMOTO". Ĉu ĝi plaĉus al vi? Kvankam mi estas kristano, mi ne entute konsentas kun dogmoj de romkatolika eklezio!

★ S-ro *Aude Andre*, S. Pierre-des-Corpo, Francujo

De jam kvar jaroj mi legas la revuon OOMOTO, ĝi estas por mi plenalora dokumentaro, per ĝi mi konstatas kiom kuraĝe kondukas niaj japanaj gesamideanoj en la luktado por la paco, dank' al ili

multaj japanaj komunumoj mondaniĝas, dank' al ili ni taksas je ĝia ĝusta valoro la nunajn murdarmilojn.

Via alvoko ne restu vana kaj ni esperu ke la blinda homaro finfine konscios kie troviĝas la taŭga vojo al homarana mondo.

★ S-ro *Ng. V. Kinh*, Hanoi, Vietnamo

Kun plezurego mi ricevas neatendite OOMOTO-n, kiun mi ne vidis de ĉirkaŭ 20 jaroj. Via revuo kontribuas tutcerte al amikiĝo de ĉiuj popoloj kiel antaŭe. Sincerajn gratulojn por la interesplena enhavo.

★ S-ro *F. Lee York*, St. Petersburg, Usono

Mi dankas vin pro la gazeto OOMOTO. Mi ĝuas legi esp-ajn aferojn, artikolojn verkitajn de legantoj kaj la spiriton de amo inter nacioj kaj individuoj, kiu estas tre necesa por la plenumo de mondpaĉo.

Mi kredas ke se 1 % de la popolo de ĉiu lando lernus Esp-on kaj ĉiu korespondus kun samideanoj en aliaj landoj kaj etendus sian manon de amikeco al ili, tio efektiviĝus plimulton por mondpaĉo kaj internacia kompreno ol ĉiuj aliaj klopodoj. Ĉiu esp-isto kapabla paroli al siaj familio kaj amikoj pri la amikeco de la popoloj de aliaj landoj. Do, 10 % de la popoloj de la mondo lernus pri la celoj de Esp-o por mondpaĉo.

Mi lernis Esp-on en malfacila maniero per lernolibro sen instruisto, sen ia persono, kun kiu mi povas paroli la lingvon. Mi estis 62-jara, kiam mi komencis studi la lingvon en 1951. Nun, mi korespondas kun 75 gesamideanoj en 25 landoj. Multaj el ili invitas min vojaĝi al ili.

Pensu kiom multe da bono VI povus fari, se VI skribus al 75 aŭ 60 aŭ 40 aŭ eĉ 20 gesamideanoj! Se VI kaj VIAJ AMIKOJ skribus al la duobla nombro da personoj, duoble multe naskiĝus leteramikoj inter la popoloj de la tuta mondo kaj duoble grandiĝus internaciaj kompreno kaj amik-eco. Pensu pri la afero!

Kvankam ni diferencas en religio, politiko kaj kutimoj, ni povas sub la verda standardo preĝi per la vortoj de L. L. Zamenhof "Ni staras nun kiel filoj de la tuthomaro al Via altaro.". Vivu Esperanto! Vivu mondpaco kaj mondamik-eco! Ni estas en unu mondo. Kial ni ne estas de unu koro?

★ S-ro Jose Mauricio da Silva, Belo Horizonte, Brazilo

De antaŭe mi intencis aboni vian revuon, sed nur pasintjare mi sukcesis fari tion pere de BRAZILA ESPERANTO-LIGO. Ĝia altnivela kaj interesa enhavo estas tiel alloga, ke mi leginte iam unu n-ron tuj entuziasmiĝis pri ĝi. Ĉar mi estas katoliko, mi ne ĉiam konsentas pri la idea enhavo; tamen pro la sincereco, kiu animas la gazeton, mi devas konfesi, ke ĝi povas esti konsiderata kiel modelo por aliaj revuoj. La agrabla presarto, la trafaj ilustraĵoj kaj fotoj, la bone zorgita enhavo, la modela lingvo, la seriozeco de la recenzoj, la kulturo, la amo finfine kiun vi dediĉas al ĝi, ĉio kontribuas por tio, ke ni ŝatu ĝin kaj kun streĉo ni atendu sciavide ĉiun novan n-ron. Se vi povas liveri kolektojn de pasintaj jaroj, bonvolu min sciigi, ĉar mi deziras ĉerpi el ili multon sciindan. Pri la prezo, bv. ankaŭ informi kaj mi pagos al ĉi-tiea reprezentanto.

La n-ron de Jan.-Feb. alportis al mi grandan surprizon. Antaŭ ol ricevi ĝin, mi aĉetis verkon, kiu pionire (kaj tio pravas ke niaj japanaj samideanoj ĉiam ankoraŭ serioze utiligas nian lingvon,

preferante prezenti konkretan fakton ol fari bombastan propagandon!) disponigis al la esp-aro scenarion de filmo. Temas pri "Gauche la ĉelisto", tre interesa verko siaspeca. Ĉi tie en Brazilo ni ne konas "pupajn filmojn". Kutime ni vidas tiujn laŭ amerika sistemo (de Walt Disney, ekzemple), kiujn nialande oni nomas "anim-itaj desegnaĵoj". Mi nur bedaŭras, ke la tradukinto preterlasis okazon por publikigi ion pli gravan, ĉar certe li posedas multon pli gravan kaj publikigindan.

Mi ekrevis pri scenario de la filmo "Raŝomon", tiu fama majstroverko de s-ro Akira Kurosawa (pri li oni tre ŝatus scii multon!). Tuj poste alvenis OOMOTO de Jan.-Feb. sub kies literatura rubriko vi publikigis la novelon "En la arbardensejo". Se mi diros ke mi apartenas al ĉi-urba kino-klubo (Centro por Kinaj Studoj) vi sendube povas imagi mian ĝojon. Mi tuj intencis traduki la novelon kaj oferi ĝin al la estraro de la Kino-Klubo. Kelkaj anoj direktas ankaŭ la plej gravan, se ne la solan, revuon pri kino — eldonatan en mia urbo — en Brazilo. Certe ili ŝatas posedi la scenarion de la nomita filmo pro teknikaj kialoj. Sed la novelo en la esp-a traduko jam estas bona akiraĵo kaj ĝi atestas pri la fideleco de la filmo.

Bedaŭrinde, nia urbe oni ne kutimas prezenti japanajn filmojn, ĉar ĉi tie ne troviĝas multaj japanoj kaj estas nur kinejo por prezenti eŭropdevenajn filmojn. La usonaj filmkompanioj nur en okazo de konkurenco konsentas prezenti altnivelajn filmojn. Cetere, laŭ tio, kion oni sciigis al ni hieraŭ, kiam estis prezentata la filmo "L' Eternel Retour" de Delannoy-Cocteau, denove la usonaj filmentreprenoj kuraĝis arogante bojkoti la prezentadon de filmoj en niaj Kino-Klubo, eĉ kiam, pro nekompreneblaj kialoj, la kontrakto jam estas subskribita kaj la prezentado anoncita! Mi mem jam ĉeestis la prezent-

adon de nur du belegaj ĉefverkoj! "Raŝomon" kaj "La Sep Samurajoj", ambaŭ de s-ro Akira Kurosawa. Cetere kun duconcerto mi povas diri, ke ĉi tie estis prezentataj ne pli ol kvar japanaj filmoj. Estas bedaŭrinde, ke la nombro estas malgranda. Tio pli, ke via arto estas io tute eksterordinara kaj nia popolo, malgraŭ ĉiaj malaltnivelaĵoj komercaĵoj, kiujn oni al ĝi altrudas, tre ŝatas ĝin. Via entuziasmiga arto ne nur povas konkuri kun iu ajn alia, sed eĉ superas grandan kvanton de filmoj kutime prezentataj. Sed temas pri komerco kaj ni ne povas devigi avarajn komercistojn ĉiam prezenti nur valoraĵojn! Tamen mi tute ne konformiĝas al la fakto ke oni ne prezentas viajn filmojn en niaj Kino-Klubo. En tiu kazo decidus nur la reala valoro de la filmo. Mi ankoraŭ nenion scias pri la prezentado de iu ajn japana filmo en nia klubo. Ŝajnas ke la filmofako de la "Muzeo por Moderna Arto" en São Paulo, kiu ĝenerale liveras ĉiujn filmojn al la Kino-Klubo ne posedas ilin. Tio estas manko, kiu urĝe bezonas riparon, ĉar kiam temas pri kulturo ne praviĝas tia neglekto. Se al ni fakte estas prezentataj filmoj de preskaŭ ĉiuj landoj, ekde la sensonaj primitivaj filmoj ĝis la lastaj majstroverkoj, ne estas superflue substreki kaj emfazi la gravecon, kiun kaŭzas la fakto, ke la Muzeo ne posedas japanajn filmojn, ĉar estas granda la amplekso de la reto de niaj Kino-Klubo. Se vi povas ion fari tiurilate, eĉ se necese sin direktante al superaj instancoj, mi varme kuraĝiĝas vin. Ne nur pro laŭdinda patriotismo, sed pro amo al kulturo kaj pro esperantismo mem, kiu nin instigas nuligi ĉiujn barojn al la disvastigo de ĉio bona, bela kaj instrua. Pardonu se mi tiel insiste vin petas ekzameni la aferon kaj ne ŝpari penon. Mi esperas, ke ĉion fareblan vi faros, ĉar vi okupiĝas en

kultura afero. Min instigas nur granda admiro al via popolo. Cetere, similan alvokon mi ŝatus fari al pluraj alilandaj samideanoj.

Mi tradukis "En arbardensejo" en la portugalan lingvon. Mi deziras scii, ĉu vi povas permesi eventualan publikigon. La multobligita bulteno, kiu oni disdonas al la anoj estas por interna distribuado kaj ĝenerale la teksto rilatas al prezentota filmo.

Kun plezuro mi legis en la n-ro de Majo-Junio leterojn (en bona lingvo!) el niaj rusaj samideanoj. Grandegan ĝojon alportas la revivigo de nia movado inter tiu admirinda popolo!

★ S-ro H. Löffler, Mittweida, Germanujo (DDR)

Via enhavo-riĉa organo plaĉis ne nur al mi, sed ĉiuj aliaj geesperantistoj en mia rondo tralegis ĝin kun granda intereso.

Bedaŭrinde, la laboro por Mondcivitaneco ne estas permesata en nia respubliko, tamen mi jam delonge estas mond-civitaneco-ano. La propagando por Esp. ĉe ni estas nur ebla per praktikoj, kaj la geamikoj pro tio vigle serĉas diversajn materialojn por murgazetoj ktp. Mi mem fondis en klubdomo Karl-Marx-Stadt Korespondcirklor, nomatan "Weltjugend" (Mondjunularo) kaj mi petas vin, laŭeble publikigi jenan sciigon en iu numero de OOMOTO:

Germana letercirklo "mondjunularo" en Karl-Marx-Stadt petas ĉiulingvajn korespondemulojn sendi materialojn por murgazetoj. Ni fariĝu amikoj per internacia korespondado! Skribu al: Letercirklo "Mondjunularo" ĉe Klubdomo Jupp Augenforth, Karl-Marx-Stadt, Weststr. 18, aŭ al Helmut Löffler, Mittweida, Theaterstr. 1, Germanujo - DDR.

Indekso pri OOMOTO 1956

Titolpagaj :

Ora Jubileo de Japana Esp-movado.....	65
Nia Prez. I. Deguĉi al Vietnamo.....	97
Publika Letero al S-ro Bulganin	129
Subtenu Japanan Kampanjon Por Instaligi Esp-Kurson en Radio-Programo.....	161

Religiaj kaj Filozofiaj :

Memornoto de <i>Hidemaru Deguĉi</i>	2, 34, 66, 98
Dio de la Vivantoj	4
La Fontano de Amo	36
Religio kaj Scienco	77, 184
Diskuto pri Dio	101
Pri OOMOTO	110
Destino kaj Sorto.....	164
Du Grandaj Leĝoj	170
Proskopio, Determinismo, Antaŭdestino kaj Libera Volo	175

Pri-Esperantaj :

Vero el Eraro	10
Nekrologo al s-ro J. Okamoto	46
Esperantistoj agu por la PACO!	68
Oficiala Informo de la Akademio de Esperanto	112
Verdstelana Agado en Rio Negro kaj Mafra	123
Moskva Festivalo	128
Novaj glumarkoj eldonitaj memore al la Olimpiaj Ludoj en Melbourne.....	160
Japan-Faka Ekspozicio altiri Admiron.....	179

Diversaĵoj :

Porpacaj Movadoj	
Japano Parlamento Pasigis Rezolucion por Ĉesigo de A- kaj H-bomba Eks- perimentado	12
Mondaniga Deklaro de Tomo-Urbo	12
Ĝenerala Kunveno de Japana Unuiĝo por Mondfederacia Registaro	13

Mondaniga Deklaro de Fukujama-Urbo kaj Kaŭasa-Vilaĝo en Japanujo	51
Tria Kunsido de Reprez. de Japanaj Mondanigitaj Urboj	108
Mondaniga Deklaro de Kotohira- Urbo	109
Mondaniga Deklaro de Hube-Vilaĝo	131
Ĉesigu Atom- kaj Hidrogen-bombojn!	132
Mondaniga deklaro de du japanaj komunumoj	181

Pri Teks-Fajenco, Novskola Ceramiko ...	7
Ni laŭdu la Infanajn Heroojn!.....	38
Pri <i>La Bodidarmo</i> de Onisabro	39
Zen-isma Influo sur Japana Arĥitekturo	70
Unesco-Novajaĵoj.....	75
Tuĉpentrado kaj Virtuozo Seŝŝu	103
50-jara jubileo de literatura agado	100

Literaturaĵoj kaj poemoj :

Glora Ekstermiĝo	19
En Arbardensejo	20
La Takase-ŝipo	52
Printempo	67
Kanzan kaj Ĵittoku	86
O'Gin	116
La elekto de rom-papo	146
La hombovo	182

Serioj :

Japana kulturo	41, 148
Literatura Rubriko	14, 48, 80, 113, 156, 186
Parolas la Legantaro	29, 62, 83, 124, 154, 189
Poŝtmarka Informo en 1956	19, 51, 76, 122

